

l'esperanto

revuo de itala esperanto-federacio

Anno 32 - Numero 2

23 febbraio 2001

*Questa rivista viene inviata in omaggio a tutti gli europarlamentari italiani, per tenerli costantemente informati sul problema della comunicazione in Europa, sulle attività del movimento per la lingua internazionale esperanto e sulle proposte da questo presentate.
A tale scopo è particolarmente dedicata la rubrica "L'Europa e la Lingua".*



***Triesto,
la komunuma teatro "Giuseppe Verdi"***

L'ESPERANTO

Organo della FEI - Federazione Esperantista Italiana
Organo de IEF - Itala Esperanto-Federacio

Ente Morale con D.P.R. 28-6-56 n. 1720

Direttore responsabile/ Leĝe respondeca direktoro:
Umberto BROCCATELLI

Redattore / *Redaktoro*: Umberto BROCCATELLI
Via G. Brodolini 10, I-00139 Roma - Tel. 06.87.13.50.19
(anche fax, previo avviso telefonico / *riceveblas ankaŭ faksoj, sed necesas telefona antaŭanonco*). Posta
elektronika / *e-poŝto*: u.broccatelli@tiscalinet.it /
u.broccatelli@libero.it

Corredattore / *Kunredaktoro*: Carlo SARANDREA
Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 Roma - Tel.-fax 06.63.28.39

Amministrazione / *Administrejo*:
Fei - Via Villoresi, 38 - I-20143 Milano - Tel./fax
02.58.10.08.57 - c/c post. / *pĉk* 37312204
Banca (*bankkonto*): Banco Ambrosiano Veneto, Milano
0002, Cod. ABI 03001, CAB 01602, n. conto 36255-62
Conto UEA / *UEA-konto*: *ief*-p
Posta elettronica: *f.esp.it@infinito.it*
Internet: *http://www.esperanto.it*

Comitato esecutivo della Fei / *Plenuma komitato de Ief*:
Giordano FORMIZZI, presidente / *prezidanto*
Renato CORSETTI, vice-presidente / *vicprezidanto*
Gustavo BONVECCHIATO, segr. gen./ *ĝen. sekretario*
Gianfranco POLERANI, cassiere / *kasisto*
Laura BRAZZABENI, insegnamento / *instruado*
Alessandro SIMONINI, congressi / *kongresoj*
Fabrizio PAGLIAROLI, informazione / *informado*

Pubblicazione riservata agli Associati

Quote associative 2001:	Lire	Euro
Associato ordinario	50.000	25,82
Associato sostenitore	150.000	77,46
Associato garante	500.000	258,20
Associato fino a 25 anni	25.000	12,91
Associato familiare	25.000	12,91

Tutte le quote, tranne quella di Associato familiare, danno diritto a ricevere la rivista.

Agli Associati sostenitori sarà inviato in omaggio un libro; agli Associati garanti è offerta l'iscrizione gratuita al Congresso nazionale.

Le iscrizioni si ricevono presso i Gruppi locali oppure direttamente presso l'amministrazione Fei.

La IEJ (Itala Esperantista Junularo - Gioventù Esperantista Italiana) è la sezione giovanile della Fei. Ne fanno parte gli Associati fino all'età di 30 anni. A cura della IEJ sono redatte le pagine di *Nova Sento* all'interno della rivista.

Registrazione al Tribunale di Milano n. 85 del 27 febbraio 1970

Stampa: Elettrongraf - Via Dina Galli, 5 - 00139 Roma
tel. 06.87.13.62.64

In copertina: Trieste, il teatro comunale "G. Verdi"

Anno 32 - N. 2

23 febbraio 2000

Ni ŝparu!

Kiel vi povas legi je p. 3, la Estraro de IEF decidis ke ekde nun nia revuo estos ĉiam 16-paĝa, kun du paĝoj dediĉitaj al "Nova Sento", kiuj fariĝos kvar unufoje jare. La decido estas tute pravigebla laŭ buĝetaj kialoj, sed tio signifas ke la redaktoro disponos je 14 paĝoj por ĉiu numero anstataŭ 16. Do, bonvolu indulgi lin, se fojfoje ne aperos, aŭ aperos nur tre koncize, tiu aŭ alia informo, tiu aŭ alia artikolo aŭ literaturaĵo.

En tiu ĉi numero la junuloj petis uzi 4 paĝojn, sed la redaktoro malavare eĉ "donacis" al ili plian paĝon, por doni sufiĉan emfazon al la baldaŭa 25a Internacia Junulara Festivalo okazonta en Bolsena, kaj montri la aliĝilon, kvankam en iom reduktita formato, inkluzive de ĝia sprita anonca bildo.

Pasintnumere aperis artikolo de teatra verkisto, kiu en *La Stampa* konfesis ke li ne scipovas la anglan! Respondante al nia peto rajtigi la aperigon, li tre afable diris ke li intencas reveni sur la temon kaj paroli ankaŭ pri Esperanto. Tion li ja faris kaj nun ni konigas al niaj legantoj lian duan artikolon (p. 5), kies titolo en esperanto estus "Kiel eviti al si la koloniigadon fare de la angla. Esperanto ja valoras lingvon".

Krom la kutimaj rubrikaj informoj, vi trovas novan rubrikon itallingvan "Come si dice?", kiu celas respondi al lingvaj duboj de lernantoj de Esperanto (p. 8). En la sama paĝo vi trovas ankaŭ reprodukon de la prezenta paĝo aperanta ĉe konektiĝo en Interreto kun la ejo de Itala E-Federacio: *www.esperanto.it*. Ni konsilas ĉiun, kiu havas aliron al Interreto, viziti ĝin kaj ankaŭ sciigi siajn opiniojn pri ĝi al la "ej-estro" aŭ ankaŭ al ni. En tiu ejo vi povas legi nian revuon iom pli frue ol ĝia alveno per poŝto al via hejmo, kaj la fotoj, kiuj sur papero aspektas nigra-blankaj, ĝenerale vidiĝas koloraj. Per mesaĝo al *esperanto@infinito.it* vi povas peti esti daŭre informataj pri la apero de nova numero en la ejo.

La venonta numero estos "Speciala numero", tute nacilingva, kun rilato al "2001, jaro de la lingvoj".
(Red.)

Associati sostenitori 2001

Gustavo BONVECCHIATO, Milano
Maria Luisa FAIELLA, Milano
Luigi FRACCAROLI, Brescia
Umberto FRONCILLO, Genova
Serenella GIACCHINO TERRUZZI, Milano
Gianfranco POLERANI, Milano
Ermigi RODARI, Milano

Offerte alla FEI (al 4/2/2001)

Maria Luisa FAIELLA, Milano	L. 70.000
Gustavo ZANOLI, Parma	" 55.000
Altre (inf. a L. 20.000)	" 24.200
Da gruppi (arrotondamenti)	" 48.000
N.N.	" 57.000

Totale L. 254.200

La riunione del Comitato Esecutivo Fei

Presso la sede FEI di Via Villoresi 38, Milano ha avuto luogo il 21 gennaio 2001 la riunione del C.E., di cui si riassume brevemente.

Proposte del cons. Pagano

La Segreteria ha presentato un messaggio di posta elettronica inviato dal cons. Pagano, che il C.E. ha analizzato, dando disposizione di inviare una risposta scritta. La proposta include alcuni punti come: cambio di provider per il sito, la possibile candidatura al consiglio di sole persone dotate di posta elettronica, a cui il C.E. ha dato risposta negativa. Altri punti della proposta sono stati rinviati al C.N., perché di sua competenza.

Seminari

Dopo il successo del seminario di Frascati del dicembre 2000 il gruppo di Massa ha proposto un prossimo seminario a Massa per i giorni 5 e 6 maggio 2001. La proposta è accettata.

Bilancio preventivo

È stato approvato il bilancio preventivo 2001.

Azioni pubblicitarie

* La proposta di inserzione pubblicitaria su "Oggi" si è verificata incompatibile per l'alto costo e l'esiguità della divulgazione (solo Lombardia).

* Saranno contattate riviste del settore informatico per la pubblicazione di un articolo su Esperanto e computer.

* L'inserimento del CD-ROM di Dematheis nell'"Espresso" (tiratura 500.000 copie) non è realizzabile finanziariamente, dato l'elevato numero di CD-rom da proporre con relativi bollini di tassa Siae.

* Catalogo libri in esperanto: Corsetti viene incaricato di fare l'elenco dei libri da mettere in rete.

2001, anno europeo delle lingue

Verrà pubblicato un numero speciale della rivista su questo argomento. Verrà inviato ai gruppi un volantino da distribuire sul significato di questo anno europeo delle lingue.

Le proposte di progetti discusse nel C.E. del 8 ottobre 2000 non sfoceranno in progetti finanziabili nell'ambito dell'anno europeo delle lingue, in quanto l'Esperanto non è considerato lingua finanziabile (come riferito dall'incaricata per l'Italia, responsabile dei progetti).

Revisione del corso KIREK

Il corso, più che rivisto, andrebbe del tutto rifatto, dato che presenta troppe imperfezioni, frasi non comunicative, esercizi solo di traduzione. Un'idea sarebbe quella di utilizzare il corso per corrispondenza dei tedeschi.

Rivista

La rivista sarà ora di 16 pagine, di cui 2 pagine da destinarsi a *Nova Sento* (a richiesta); una volta all'anno si riserveranno a *Nova Sento* 4 pagine. Alla IEJ si chiederà un contributo forfetario.

In caso di richieste da parte di persone dei *B-landoj* di abbonamento alla rivista la tariffa è di 12 euro da inviare sul conto della FEI presso l'UEA.

Congresso di Trieste

È pervenuta una dettagliata e rincuorante relazione sull'organizzazione da parte di Edvige Tantin, Presidente del LKK.

Proposta Bronzetti

Attualmente Bronzetti e i suoi collaboratori stanno agendo come "Comitato nazionale di difesa delle lingue e delle culture".

Nobel per la pace all'UEA

Ci si attiverà per ottenere dei sostegni alla candidatura per il prossimo anno.

Prossima riunione

La prossima riunione del C.E. si terrà a Massa il 25 marzo 2001

Laura Brazzabeni

La 35a ILEI-KONFERENCO

28/07 - 04/08/01,

Lovran, apud Rijeka, Kroatio

Atentigindas la bona novaĵo ke ĉi-jare eblas okazigi nian konferencon en la gastlando de la 86-a UK, en alia parto de la lando facile atingebla aŭtobuse de Zagrebo. Pro la tre diversaj projektoj de ILEI, aktualaj kaj planitaj, la programo fariĝas tre bunta kaj alloga al ĉiu membro de ILEI. Sekciestroj aparte kuraĝigu kiom eble plej multajn sekcianojn al ĉi tiu memorinda evento.

Gravaj komitatataj kunsidoj aparte, la programo konsistas el kvar ĉefaj temoj kio bedaŭrinde malebligis efikan partoprenadon en ĉiu kampo sed tute ne mankas interesa elektopovo.

1. Projekto Interkulturo estas pritraktota per seminario por partoprenantaj grupoj kiuj verŝajne jam prezentos sin ĉe UK. Kadre de ĉi tiu seminario estas proponataj:

a) kelkaj laborgrupoj kie la instruistoj interdiskutos kaj eksperimentos kiel kunlabori en la projekto IK ekz. metiejaj esplorgupoj respondaj je la metiejaj aŭ esplortemoj de kvazaŭlernejo "T. Sekelj" - proverbejo, ludejo, matematika ktp.

b) komunaj prezentoj kaj diskutoj, ekz. raportoj pri la ĝisnuna situacio kaj pri regionaj kaj/aŭ ringaj evoluado, organizaj proponoj pri daŭrigo de tiu aŭ alia projekto.

2. La ekzamensistemo kaj la instruprogramo

ILEI aprobis ĉe UEA-komitato novan porinstruistan ekzamenan sistemon. La konferenco prezentas bonegan ŝancon pro informi, diskuti kaj trejni pri tio.

a) Prelego/debato/laborgrupo pri la supra temo

3. La novaj iniciatoj pri la universitata agado

a) specifa laborgrupo

4. Cseh-seminarioj

Atilio Orellana Rojas, Direktoro de Internacia Esperanto Instituto, gvidas trejn-kurson por instruantoj de Esperanto kiuj volas diplomiĝi pri la rekta instru-metodo de Andreo Cseh.

Kontribuontoj kaj prelegontoj anoncu sin al *Jennifer Bishop*, estrarano por konferencoj: 39 Hill Street, Hawthorn, Victoria 3122, Aŭstralio

e-poŝto:

esperanto@education.monash.edu.au

ANGOLO DELL'ISTITUTO

Il giorno 11 novembre 2000 ha avuto luogo una seduta del Consiglio Direttivo dell'**Istituto Italiano di Esperanto**, con la presenza di tutti i consiglieri. Nelle ultime sedute si è vista sempre la presenza all'unanimità degli eletti.

Si è analizzata la situazione finanziaria e quella dell'andamento degli esami, che non è variata di molto rispetto all'assemblea di Casalecchio. Durante l'anno 2000 sono stati sostenuti vari esami di III grado, ma nel complesso il numero degli esaminati è diminuito. Colpa delle Cattedre o dei gruppi locali che non hanno fatto abbastanza propaganda per i corsi? Colpa della mancanza di interesse a studiare la "nostra lingua"? Colpa dell'Esperanto in sé che non ha prospettive, visto che se si vuole ottenere successi nel mondo professionale bisogna conoscere bene l'inglese? Non bisogna dare comunque colpe, dobbiamo, se ci crediamo, persistere nel nostro lavoro di sensibilizzazione e l'Istituto e i suoi membri devono essere i primi in Italia, almeno, a farsi sentire e a collaborare per la divulgazione della lingua.

Il Consiglio ha pure analizzato la situazione delle Cattedre in Italia, evidenziando la carenza di Cattedre soprattutto al Sud; sono state analizzate diverse strategie per migliorare la situazione.

Ed ecco un'importante informazione: grazie al contributo dell'Istituto è stato pubblicato il volume 2 di "Ludu kun ni" di Elisabetta Vilisics Formaggio. L'Istituto ha ora a disposizione, per i propri membri, copie dei volumi, da ottenere su richiesta e dietro versamento di un contributo. Chi fosse interessato può contattare il Direttore Generale, Carlo Bourlot.

Il Consiglio ha pure programmato le prossime attività culturali, da organizzarsi in collaborazione con Fei o altre associazioni esperantiste e non.

Il Consiglio ha anche preso visione e discusso il lavoro della Commissione che si sta occupando della revisione e dell'aggiornamento dei programmi d'esame. La speranza è quindi di avere in futuro corsi più all'avanguardia, organizzati secondo i moderni principi glottodidattici e di conseguenza esami più corrispondenti alle esigenze del nuovo millennio. Sempre se saremo in grado di trovare i corsisti e gli esaminandi, potremmo proporre corsi ed esami moderni e in sintonia con quelli di altre lingue straniere, così gettonati.

Si comunica inoltre che gli eredi Fabris sono stati nominati Patroni dell'Istituto.

Nella speranza che il nuovo anno e il nuovo millennio diano davvero una svolta anche all'esperanto, faccio auguri a tutti di buon lavoro.

Per il consiglio direttivo IIE

Laura Brazzabeni

Michele PERRIERA

Come sottrarsi alla colonizzazione dell'inglese L'esperanto val bene una lingua

Dopo l'articolo su "La Stampa", da noi riprodotto nel numero scorso, lo scrittore è tornato sull'argomento, sullo stesso giornale, domenica 28 gennaio 2001

QUALCHE tempo fa su queste pagine, manifestavo il mio malumore verso la progressiva invadenza della lingua inglese. E maledicevo non tanto scherzosamente l'attuale civiltà che, pressata dal potere economico e militare americano, sembra quasi inebriata dall'esserne linguisticamente colonizzata. Tutto fa pensare, dicevo, che presto l'italiano, il francese, lo spagnolo, il tedesco e quante altre lingue si parlano nel mondo saranno relegate al ruolo di dialetti. E me ne dispiacevo, senza troppe fisime. Del resto, denunciando come perversa l'universale ossessione anglofona, non intendevo certo rispolverare l'ottusità nazionalistica d'altri tempi: invocavo piuttosto un vero e libertario cosmopolitismo, che avesse gli smaglianti connotati dell'arcobaleno.

Sono certo tuttavia che molti lettori abbiano supposto che io fossi costipato dalla nostalgia e dalla vana speranza di fermare il corso della storia. D'altra parte io stesso prendevo su di me il rischio di parlare al vento. Sapendo però che il vento, se spazza le cose e le idee, le fa comunque viaggiare; e non è poi così certo che le disperda per sempre. Di fatto il mio malumore è stato amorevolmente accolto da un numero sorprendentemente nutrito di lettori, molti dei quali mi hanno voluto scrivere per condividere con me la speranza che si possa ancora resistere alla tirannia della lingua inglese. Una lingua cioè che - pur essendo bella, vivace, sbrigativa e solerte - non può certo vantare un diritto di invasione che sia fondato su importanti ragioni morali e culturali.

Una particolare simpatia verso i miei argomenti hanno voluto manifestare i sostenitori dell'esperanto, la «internazionale» lingua artificiale che da un centinaio d'anni viene sostenuta e coltivata da molte appassionate minoranze. Alcuni di loro mi scrivono più o meno: «È bello che lei abbia contestato il crescente imperialismo della lingua inglese. Ma se si ferma a questo, lei rischia di intonare un dolce canto funerario. Manca nel suo articolo un'alternativa concreta e convincente. Poiché l'odierna civiltà deve disporre di una lingua che renda internazionale la comunicazione, si tratta di indicare in che modo questo può avvenire senza decretare la supremazia di una cultura sulle altre. Ebbene, noi pensiamo che la soluzione stia nella universale adozione dell'esperanto. Si tratta infatti di un linguaggio esplicitamente strumentale, che non cancellerà mai le lingue "naturali", anzi rimanderà puntualmente ad esse, come particolari e insostituibili testimonianze di cultura vissuta».

Conoscevo da molto tempo, com'è ovvio, l'esistenza del movimento esperantista e il vigore con cui sostiene la necessità che l'esperanto si insegni nelle scuole. E confesso di aver sempre guardato con simpatia ma con un certo scetticismo a una proposta che, mi dicevo, non reggerà mai all'urto della storia. Ma ora che avverto sempre più vicina l'occupazione anglofona della Terra e leggo la passione e le ragioni degli esperantisti che mi hanno scritto, sono tentato di credere che forse l'esperanto è una buona soluzione. Vale la pena di rifletterci almeno. Tutti, intendo, da tutte le parti del mondo.

Certo, per quanto attiene a noi italiani, non è forse inopportuno ricordarsi che la nostra migliore tradizione culturale ha un valore morale inestimabile ed esso non può rischiare di essere sepolto dalla invasione linguistica di una cultura commercialmente più forte. Ma anche le lingue più «povere» meritano non solo di conservare ma di lasciare emergere la loro differenza con pari «diritto naturale» dell'inglese. Perché questa «eguaglianza dei diversi linguaggi naturali» splenda in tutta la sua democrazia, occorre forse che la lingua comune a tutti *non sia naturale*; sia invece l'esito di una pura convenzione. Questa convenzionalità farebbe della lingua artificiale nient'altro che una lingua *virtuale*; essa, per quanto utile ed efficace, non avrebbe *un corpo vero*, il quale continuerebbe a battere col cuore delle diverse lingue naturali. Riflettiamoci almeno. Senza pigrizia e senza lasciarsi incantare dalla seduzione del più forte.

Michele Perriera

TRAMONDE

JEKATERINBURG (Rusio) - LIRO-2000 - Je la Tago de Zamenhof en Jekaterinburg estis anoncita la rezultoj de la tradiciaj belartaj konkursoj Liro-2000, kunorganizitaj de Urala Esperantista Societo (UES) kaj "La Ondo de Esperanto".

En originala prozo gajnis la premion Zora Heide (Kroatio) pro "La reveno" kaj laŭdajn menciojn: Grigori Arosev (Ruslando) pro "Nerekonebla"; Armando Zecchin (Italio) pro "Komerca reprezentanto".

En originala poezio: premio al Grigori Arosev (Ruslando) pro "Cindra soneto", "Interparolo kun subkonscio" kaj "Viro de mia revo de mia viv"; laŭdaj mencioj: Helena Melnikova (Ruslando) pro "Eks-prompte", "Mi dum tuta nokt' hodiaŭ solas..." kaj "La penso"; Klara Ilutoviĉ (Ruslando) pro "Kun kaj sen" kaj "Du aŭtunaj tagoj"; Ludmila Orajevskaja (Ukrainio) pro "Mezo de somero".

Traduka prozo (Novelo de Anton Ĉeĥov "Sapogi". Laŭreato: Miĥail Mahnac (Ruslando) - Laŭdaj mencioj: Aleksandr Uljanov (Ruslando); Jozefo Horvath (Hungario).

Traduka poezio (Poemo de Sergej Jesenin "Ustal ja ĵitj v rodnom kraju..."; laŭreato: Aleksandr Uljanov (Ruslando).

Ĉiu laŭreato ricevos diplomon kaj valoran librodonacon. Adreso:

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2000, RU-620014, Jekaterinburg-14, p.k. 162, Ruslando
sezonoj@mail.ru
http://www.sezonoj.itgo.com

MALTO - La Malta Esperanto-Societo invitas al partopreno en la **Oka Internacia Turisma Semajno en Malto**, de la 2a ĝis la 8a de septembro 2001.

La programo antaŭvidas interesajn ekskursojn kaj prelejojn. Por informoj:
Malta E-Societo, P.O. Box 142, Valletta CMR 01;
maltaesp@global.net.mt;
www.maltaesp.hypermart.net.

ZAGREBO - En julio 2001 en la kroatia ĉefurbo okazos la 15a Ekumena Esperanto Kongreso (51a Kongreso de KELI, kaj la 54a Kongreso de IKUE), la 67a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, la 86a UK, kaj la 1a Hilelista renkontiĝo. En TTT-paĝo de Hilelista rondo *http://www.geocities.com/hilelistarondo/zagreb.htm* estas ĵus publikigita senpaga reta versio de Ilustrita E-gvidlibreto de Zagrebo, kun deko da freŝegaj fotoj. (*Mato Ŝpekuljak*)

LITOVIO - La 37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-37), organizitaj de Litova Esperanto-Asocio okazos de la 7a ĝis la 15 de Julio 2001 proksime de Kaunas.

Aliĝ-kontaktadreso: p.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Stratadre-

so de LEA: str. L.Zamenhofo 5, LT-3000 Kaunas, Litovio (landa retpoŝto: *ritavalc@takas.lt*).

BEograd - (Jugoslavio) - La kvina sesio de Danuba Esperantlingva Scienca kaj Kultura Forumo (DEESKF-5) okazos en Beograd, 2001/06/07-10, en organizo de Serbia Esperanto-Ligo kaj ĝia Esperanto-Instituto.

La ĉeftemo de DESKF-5 estos: *Danubo - fakto-ro de ekonomia kaj kultura integriĝo de ĉirkaŭdanubaj landoj*.

En kvar sekcioj estos pritraktitaj diversaj aspektoj de integriĝoj en tiu multkultura kaj interkultura spaco:

1. Projektoj de regiona kunlaboro
2. Inter la Nigra Montaro kaj Nigra Maro - aktualaj problemoj kaj perspektivoj
3. Scienco kaj kulturo de la ĉirkaŭdanuba geografia spaco
4. Esperanto kiel integra faktoro en Danubio.

En apartaj programeroj estos prezentitaj la movado de Lingvaj Festivaloj de TEJO kaj la projekto Interkulturo de ILEI kun la specifa subprojekto Proverbejo, kun precipa konsidero de ilia signifo por Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 en ĉirkaŭdanubaj landoj.

Kunvenigonte esperantistajn agantojn en diversaj branĉoj de scienco kaj kulturo el ĉirkaŭdanubaj landoj, la Organiza Komitato de DESKF-5 celas ankaŭ fari pli firmajn kontaktojn kun sciencaj kaj kulturaj institucioj kaj unuopuloj neesperantistaj, kaj motivigi esperantistajn eldonajn, turismajn kaj aliajn entreprenojn kaj agentejojn por ilia kontribuo.

Prelegoj kaj komunikoj de DESKF-5 estos publikigitaj libroforme. Pliaj informoj riceveblaj de: Serbia Esperanto-Ligo (DESKF-5), Terazije 42, YU-Beograd, rete: Radojica Petroviĉ, *radp@ptt.yu*.

ĈINA RADIO INTERNACIA elsendas en esperanto je h. 20.00 - 20.30 UTC por Eŭropo sur la ondlongoj 41.29 m (7265 kHz), 30.11 m (9965 kHz) kaj 42.19 m (7110 kHz).

Lunde: novaĵoj, kurantaj aferoj, leterkesto, ni parolu ĉine; mardo: novaĵoj, kurantaj aferoj, vojaĝo en Ĉinio, semajna kanto; merkredo: novaĵoj, kurantaj aferoj, ĉina kulturo, ĉina manĝaĵo; ĵaŭde: novaĵoj, kurantaj aferoj, hodiaŭa Ĉinio, ni parolu ĉine; vendredo: novaĵoj, kurantaj aferoj, socia vivo, semajna kanto; sabate: novaĵoj, esperanto en marŝo, literaturo; dimanĉe: novaĵoj, tra la mondo, muzika programero.

ĈINIO - La revuo *El Popola Ĉinio*, kiu ne plu aperas paperforme, nun estas denove legebla per reto: *www.chinareport.com.cn* aŭ *www.espero.com*. La nova EPC estas enhavriĉa kun diversaj rubrikoj, kiaj Novaĵoj, Kulturo, Socio, Esperantujo, Inter ni, Homaro kaj naturo, Turismo, Ekonomio,

Scienco kaj tekniko, Arto, Kuirarto, Sur nia libro-breto, ktp. (elpc@china.com)

SINDIKATA NOVAĴ-SERVO - *LabourStart*, la ĉiutaga tutmonda sindikata novaĵservo (en la angla, la nederlanda kaj la norvega) anoncas sian eksperimentan servon en la internacia lingvo Esperanto. Interesuloj vizitu la retpaĝojn — <http://www.labourstart.org/eo/> — kaj sendu siajn komentojn. (El *Interredaktore*).

ENLANDE

NAPOLI - Il 9 novembre 2000, in occasione di una conferenza della prof. Antonia Martino Mazzarotti su Benedetto Croce nella sede del Centro Artistico Culturale, la giuria del Centro ha assegnato il Premio di Poesia “Città di Napoli” *Honoris Causa* al Presidente del Gruppo Esperantista Napoletano “Harmonio kaj Progreso” per la lunga azione condotta a favore dell’Esperanto. Il numeroso pubblico ha applaudito la recitazione di *Antikva ploro*. Si prevedono possibilità per l’Esperanto in un Istituto Magistrale di Stato a Napoli.

È da sottolineare che alle manifestazioni del Gruppo Napoletano hanno spesso preso parte, oltre al Presidente dell’UNUCI Gen. Franco De Vita, anche altri membri del Consiglio di tale associazione, tra cui il Gen. Umberto Giuannico e il segretario Ten. Gennaro Fiscariello. (*Enrico Mingo*)

LIVORNO - L’Unitre (Università della Terza Età) di Livorno bandisce il concorso per il settimo premio nazionale di poesia e prosa “La Vegliaia”, nel quale è prevista anche la **Sezione prosa e poesia in Esperanto**.

Può partecipare ogni iscritto all’Unitre, con due poesie a tema libero non superiori a quaranta versi e/o una composizione in prosa che non superi le quattro cartelle. Per informazioni: *Segreteria del premio “la Vegliaia”, Università della Terza Età, Via Marradi 37, 57125 Livorno, tel. 0586-899344*.

† Padre Francesco Andreoni

All’inizio dell’anno è scomparso padre Francesco Andreoni. Italiano di nascita, già nel 1920 partiva per il Siam (oggi Thailandia) dove fu missionario fino a due anni fa, quando andò a risiedere in Francia. Imparato l’esperanto già in età avanzata, lo usava per corrispondere con tutto il mondo - rammaricandosi spesso di avere conosciuto “tardi” l’esistenza dell’esperanto. Nelle rare occasioni in cui tornava in patria, teneva a partecipare ai congressi esperantisti; per molti anni è stato associato FEI.

† È deceduto il 20 gennaio, ancora giovane, a Trento il prof. **Guido Tommasi**, per vari anni attivo nel movimento esperantista nel trentino. Sentite condoglianze alla famiglia.

† Padre Giacinto Jacobitti

Il 28 gennaio 2001, all’età di 96 anni e 5 mesi, è scomparso padre Giacinto Jacobitti (al secolo: Carmelo), domenicano dell’Ordine dei penitenzieri. Era nato il 26 agosto 1904. Toscano di nascita, visse per decenni a Roma, dove, al termine del servizio quotidiano nella Basilica di Santa Maria Maggiore (*era conosciutissimo il suo confessionale con la scritta: “si confessa in esperanto”*), dedicava tutto il suo tempo all’attività a favore del movimento esperantista cattolico, per il quale fu pioniere in tanti campi, dalla liturgia alla radio. Ricordiamo alcune delle sue opere: l’organizzazione di congressi internazionali dell’Unione internazionale esperantista cattolica, IKUE (memorabile quello del 1975, cui papa Paolo VI rivolse pubblicamente un saluto); il lavoro per la lettera sull’esperanto inviata a tutti i partecipanti del Concilio Vaticano II; il pellegrinaggio internazionale in Terra Santa, attraversando via terra tutti i luoghi biblici; la campagna internazionale per la realizzazione dei pannelli con le preghiere in esperanto, presenti in Terra Santa; la redazione e la stampa per molti anni, del periodico “Katolika Sento”; la prima traduzione in esperanto dei testi della Messa e le successive numerose versioni (*per facilitarli il lavoro imparò, a 80 anni, l’uso*



della videoscrittura); la prima approvazione ufficiale (1966) della Messa in esperanto; le trasmissioni in esperanto di Radio Vaticana (1977) di cui p. Jacobitti fu redattore fino al 1980. A tutto questo va aggiunta l’instancabile attività per la diffusione dell’esperanto e il sostegno a molte iniziative di beneficenza (ma di questo preferiva che non se ne parlasse). Nel 1992 fu trasferito a Firenze, lasciando Roma e con essa, ogni attività esperantista. A Firenze continuava a confessare nella Basilica di San Marco, per ore ed ore. L’anno scorso, a causa di un peggioramento della salute, era stato trasferito nel convento dei domenicani a Fiesole, dove in pochi mesi è spirato.

(nella foto: p. Jacobitti, redattore delle trasmissioni in esperanto, salutato da Giovanni Paolo II nel corso della visita che il Papa fece a Radio Vaticana nel 1980)

COME SI DICE?

Riteniamo utile aprire una rubricetta, in italiano, in cui rispondere a eventuali dubbi circa la grammatica, il vocabolario o la fraseologia dell'esperanto, che possono sorgere in chi sta cominciando a studiare la lingua.

Cominciamo con un paio di domande poste da un'allieva del KIREK, che chiede:

1. Perché, quando scriviamo CHE ORE SONO, ci vuole la A aggiunta al correlativo KIOM come è scritto nella lezione?
2. È giusto tradurre la frase "Quanti giorni formano una settimana?" con "Kiomaj tagoj estas unu semajno?"

Risposte:

1. Per indicare le ore si usano i numeri ordinali: sono le sei = *estas la sesa* (sottinteso *horo*), cioè "è la sesta ora". E i numeri ordinali si formano aggiungendo *-a* al numero cardinale. Per questo motivo per domandare che ore sono si usa la forma in *-a*: *kioma horo estas?*
2. "Quanti giorni formano una settimana" si dice *Kiom da tagoj estas unu semajno?* oppure *El kiom da tagoj konsistas unu semajno?* (= di quanti giorni consiste - è fatta - una settimana?), ma la prima forma con *estas* va benissimo. Ricordiamo che La preposizione *da* si usa dopo sostantivi o avverbi che indicano una più o meno definita unità di misura: *kilogramo da pano* = un chilo di pane; *glaso da biero* = un bicchiere di birra; *kiom da pano vi aĉetis?* quanto pane hai comprato? (alla lettera "quanto di pane hai comprato?"); *li havas multe da mono* = egli ha molto denaro (confronta il francese *beaucoup d'argent*).

Notiamo che quando la quantità è espressa non da un sostantivo (come *kilogramo*), ma da un avverbio di quantità (come *kiom, tiom, multe, tro* ecc.), l'eventuale accusativo scompare:

"*Li aĉetis kilogramon da pano*", ma "*kiom da pano li aĉetis?*". *Vi perdis tro da tempo* = hai perso troppo tempo.

Se questa rubrica v'interessa e se avete delle domande da porre, scrivete alla redazione per posta ordinaria o elettronica. Se scrivete per posta elettronica usate, per le parole esperanto, la codifica -x.

(Red.)

Il sito www.esperanto.it: per studiare l'esperanto, per conoscere il movimento

The screenshot shows the homepage of the Esperanto movement website. At the top left is the Esperanto logo (a green 'E' with a horizontal bar). The main navigation bar includes: **Impara l'esperanto**, **Incontra con l'esperanto**, **Legu en esperanto**, and **Agisci per l'esperanto**. Below this are several columns of links and information:

- Corsi & manuali**: Corsi via email, postali, manuali, vocabolari...
- Gratis in Australia?!**: Studia l'esperanto e visiterai il mondo!
- L'esperanto, oggi**: Riconoscimenti ufficiali, letteratura, musica... A che punto siamo?
- Fondazione Marelli**: Concorsi al Premio Marelli!
- Il manifesto di Praga**: le basi ideali del movimento
- Il nostro Festival**: L'incontro giovanile più importante d'Italia. **Le foto dell'IEF 2008**
- Il congresso nazionale**: L'incontro di tutti gli esperantisti italiani.
- In Italia**: Il calendario dei prossimi incontri.
- Nel mondo**: Gli incontri più importanti e il calendario completo.
- CoEdEs**: Ordina dal nostro catalogo!
- Letteratura**: Una presentazione e i principali sb.
- Kiosk**: Periodici in tutte le lingue!
- Aspetti psicologici dell'esperanto** di Claude Piran
- IEJ**: Gioventù Esperantista Italiana. Per giovani.
- FEI**: Federazione Esperantista Italiana. Per tutti.
- IEI**: Istituto Italiano d'Esperanto. Per insegnanti.
- E.R.A.**: "Esperanto" Radikale Asocio. Associazione Esperantista Radicale.
- PLI**: PremiLibertatis: premigrupo per atentig al la gazetaro

On the right side, there is a sidebar with sections: **Novità** (including IEF 2008 and Congresso 72°), **La nostra rivista** (with a thumbnail for 'l'esperanto'), and **Links** (including Remo Rombi).

TEATRO COMUNALE G. VERDI - TRIESTE

Komunuma Teatro G. Verdi - Triesto 1801 - 2001

200 jaroj plenaj je muziko kaj spektakloj

Triesto ĉiam amegis teatron, kvankam ĝi sukcesis akiri por tio sidejon nur komence de la jaro 1700. La suneliro de tiu jarcento lumigas urbeton lokita sur deklivoj de la monteto de Sankta Justo, kun nur sesmil enloĝantoj, sed sufiĉis la decido starigi tie 'Zona franca' fare de Karlo la 6a en j.1719, por rapidigi disvolviĝon, por favori aŭdacajn trafikajojn, malproksimajn komercojn, por ekkonstrui novan urbon apud tiu malnova.

Je la j. 1705 datas la unua rajtigo konstrui teatron, kiu okupis salonon ĉe la Urba Palaco, lokitan siatempe kie hodiaŭ troviĝas la *Caffè degli Specchi* (Kafejo kun Speguloj). Ĝia nomo, laŭ venecia tradicio, estis tiu de la apuda paroĥo, do Sankta Petro.

Sed la historio pri la nuna triesta teatro komenciĝas en 1798, kiam la reprezentanto de la Ĉefduka Regno de Toscana en Triesto, la komercisto Gian Matteo Tommasini, vendas la areon al Grafo Cassis, nomita Faraono pro la riĉaĵoj akiritaj en Egiptio, unua posedanto de la teatro, kiu en la jaro 1835 fariĝos posedaĵo de Moisè Hirschel, kies heredantoj en 1861 cedos ĝin al la Komunuma Administracio.

La teatro, nomita *Teatro Nuovo* (Nova Teatro), estis inaŭgurita la 21an de aprilo 1801 per prezentado de la ĉefverko de Simone Mayr, la opero "Ginevra di Scozia", kiu triumfis kaj estis prezentita 20 fojojn.

Ĝia nomo ŝanĝiĝis plurfoje: en la j. 1820, Teatro Grande (Granda Teatro), en la j. 1861, Teatro Comunale (Komunuma Teatro), kaj finfine en la j. 1901, Teatro Comunale *Giuseppe Verdi* (Komunuma Teatro *Giuseppe Verdi*). Notindas ke ĝi estis la **unua** teatro en la mondo, kiu ricevis la nomon de *Giuseppe Verdi*.

En la du jarcentoj ĝi estis plurfoje renovigita kaj plibonigita tiel ke hodiaŭ ĝi havas 1400 sidlokojn.

La decido de la Komunumaj Regantoj titoli la teatron al Giuseppe Verdi datas je la 27a de januaro 1901, nur kelkajn horojn post la morto de la Majstro. Jen la teksto de tiu decido:

1. sendi al la milana urbestro, hon. Mussi, telegramon esprimanta la partoprenon de Triesto al la funebro trafinta la italan nacion;
2. taskigi la vic-prezidanton de la komunuma konsilantaro, hon. Edgardo Rascovich reprezenti la urbon al la funebra ceremonio;
3. sendi florkronon kun urbokoloraj rubandoj kaj kun la dediĉo: "Triesto al Giuseppe Verdi", kiu devus esti lokita sur la ĉerko;
4. titoligi al Giuseppe Verdi la komunuman teatron;
5. titoligi al Verdi la placon antaŭ la teatro.

Al Giuseppe Verdi la triesta teatro estis speciale ligita pro diversaj kialoj. Ĉi tie du operoj estis unufoje prezentitaj al publiko: en 1848 *Il Corsaro* (La Korsaro) kun partopreno ankaŭ de Giuseppina Strepponi (pli poste lia edzino) kaj en 1850 *Stiffelio*, kiun Verdi mem prizorgis kaj koncertis.

Verdi kaj liaj operoj estis aparte amataj de la triesta publiko ankaŭ pro politikaj kialoj. En tiu tempo Triesto apartenis al la Aŭstra-Hungara Imperio kaj Verdi reprezentis la italajn sentojn de la urbo.

En la nuna oper-sezono, Verdi havas specialan lokon: oni komencis per *Attila*, daŭrigis per *Stiffelio*, *Rekviemo Meso*, kaj finos per *Otello*, ĝuste post la fino de nia 70a itala kongreso de esperanto. *Otello* estos prezentata trifoje: la 2an, la 5an kaj 7an de aŭgusto, tiu kiu dezirus spekti ĝin... anonciĝu: ni klopodos havigi la sidlokojn. Sed ne forgesu aliĝi kaj mendi dormlokon kiel eble plej rapide, jam estas problemoj pro rapidiĝinta malplia disponeblo de ĉambroj ĉefe unulitaj. Vi helpos la organizantojn, ŝparos monon kaj estos certa pri bona kaj favora enhoteliĝo.

Edvige

nored@tiscalinet.it

testudo@adriacom.it

esperantotrieste@adriacom.it



Diversaj aŭtoroj, *Bahaismo kaj Esperanto*, festlibro okaze de la 25-jariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo. 1997 -154 Bahaa esperanto - Ligo; P.O. Kesto 500133; DE-60391 Frankfurt, Germanio. Paĝoj 57.

“La tago alproksimiĝas kiam ĉiuj popoloj de la mondo akceptos universalan lingvon kaj komunan skribon. Kiam tio estos atingita, ĉiu homo, kiun ajn urbon li vizitos, kvazaŭ eniros en sian propran domon. . . Tiu vere estas homo, kiu hodiaŭ dediĉas sin al la servo al la tuta homaro. . . Ne gloru sin tiu, kiu amas sian propran landon, sed tiu, kiu amas la tutan homaron. La tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.”

Meze de la unua granda blanka paĝo kuŝas tiuj ĉi vortoj de Baha’u’llah. Postvenas, en la sekvanta paĝo, salutvortoj de la prezidanto tiutempa de UEA, Lee Chong-Yeong, kiu asertas, interalie, ke “pere de la internacia komuna lingvo ni serĉas unuecon en diverseco, por pli justa kaj paca mondo, kaj finfine kreo de pli justa nova internacia lingva ordo. La fina celo de la Bahaa Kredo estas la kreo de unueco inter ĉiuj popoloj de la mondo, pere de kreo de nova internacia ordo. En tia senco la interna ideo de Esperanto kaj la Bahaa Kredo havas komunan eron.”

Sekvas antaŭparolo de la Prezidanto de Bahaa Esperanto-Ligo, Heinz-Dieter Maas; du artikoloj de Lidia Zamenhof, la plej juna el la tri Zamenhof-infanoj, kiu “kvazaŭ enkorpiĝas la kunfandiĝon de Bahaismo kaj esperanto”; legoj pri originoj, evoluo, celo kaj aktivecoj de Bahaismo; la bahaanoj kaj la Esperanto movado; la disvolviĝo de Bahaa Esperanto-Ligo; ses biografiaj skizoj pri gravaj homoj kiuj “ludis gravan rolon kaj en la Esperanto-movado kaj en la Bahaa Kredo: Lidja Zamenhof kaj la esperantistaj “Manoj de la Afero de Dio”, Martha Root, John E. Esslemont, Agnes Baldwin Alexander, Hermann Grossmann, Albert Mühlshlegel. La devoj de la Manoj de la Afero “estas disvastigi la Diajn Aromojn, edifi la animojn de l’ homoj, antaŭenigi klarecon, plibonigi la karakteron de ĉiuj homoj kaj esti, ĉiutempe kaj ĉiakondiĉe, sanktigataj kaj sendependaj de materiaj aferoj.”

Tiu ĉi libreto “certe ne priskribas komplete ĉiujn aspektojn kaj facetojn de la historio kaj rilatoj

inter Esperanto kaj Bahaismo, sed ĝi estas feliĉe atingita etapo.”

Estas multaj fotoj, tiuj de gravaj homoj nomitaj, de bahaa adorejo apud Nova-Delo kaj en Hajfa, la domo kaj la tombejo de Báb, kaj aliaj, ĉiuj blanka-nigrakolore.

Filomena Canzano

Valerij Brjusov, *Kvar Noveloj*, serio Rusa Literatura; volumo 5. Antaŭpar. A. Korĵenkov. - Jekaterinburg: *Sezonoj*, 1999. Tradukis el la rusa Grigori Arosiev (vicprezidanto de Tejo, redaktoro de *Monato* por arta rubriko, aŭtoro de poemaro), Aleksander Korĵenkov (eldonisto kaj redaktoro), Ilisia Novikova (manaĝero kaj tradukisto). Korektis Halina Gorecka. Paĝoj 24. Prezo ne indikita. Sur la verda kovrilpaĝo estas gravuro de Dürer “Kavaliro, Morto kaj Diabolo” (1513).

Tiu ĉi volumeto enhavas tri novelojn el la kolekto *La akso de la tero* kaj unu el *Noktoj kaj tagoj* de Brjusov. La aŭtoro, kunfondinto de la rusa poezia simbolismo, poeto, tradukisto, estas ankaŭ romanisto malpli bone konata. Oni ne konsilas la legon al impresigemaj homoj, ĉar temas kvazaŭ pri “horor-noveloj”. Oni legas tuje tiujn ĉi paĝojn. Linioj fluadas rapide, baldaŭ alvenas fino. Situaĉioj prezentitaj montras malprecizan nebulozan “svagan limon inter la reala kaj la fantazia mondo, ilian reciprokan influon”. Tre grava estas la personeco de la protagonistoj. En “*Nun, kiam mi vekigis*”, temas pri psikopato, al kiu la sonĝoj plaĉis pli ol la realo, ĉar “la agoj ekzistos nur por ni mem, kaj ili restos nekonataj en la cetera mondo” kaj sciante ke li restos absolute sen puno, li “hastis fari ion sovaĝan, malican kaj pekan”. Sed... “*En la spegulo*” temas pri ulino kiu plenigis sian “tutan ĉambron per speguloj, grandaj kaj etaj, fidelaj kaj iomete mispegulantaj” kaj rigardis longajn horojn kaj tagojn ĝis unu el la “sozioj fantomaj” iĝis fatala: komenĉigis batalo inter ŝi kaj ŝia rivalo, kaj...

En “*Marmora Kapo*” la protagonisto estas vagulo, aĉe vestita, preskaŭ ĉiam ebria, frostiĝinta kaj malsata. En “*Nokta aventuro*” estas la Diabolo, kiu montras “mondojn, kiujn vi ne povus imagi.”

Filomena Canzano

INCONTRI INFORMATIVI PER NOVIZI E CURIOSI ALLE PORTE.

La Gioventù Esperantista Italiana sta organizzando degli incontri informativi per *novuloj* (novizi) e curiosi con lo scopo di raccontare ai giovani che si avvicinano all'esperanto qualcosa del movimento e del mondo di nuove esperienze che questo può aprire loro.

A differenza del passato gli incontri saranno tre:

1. In contemporanea a **Napoli** e a **Vicenza** dal sabato pomeriggio **3** a domenica mattina **4 marzo** con pernottamento "alla buona" tutti insieme sul luogo dell'incontro.
2. A **Frascati** il **6 marzo** pomeriggio.

Durante gli incontri su due giorni si potrà imparare molto: si parlerà degli incontri giovanili in genere, del Festival in particolare, della IEJ e della TEJO, della FEI della UEA, del cosmo esperantista dei suoi ideali e valori; distribuiremo materiale informativo e illustreremo le concrete opportunità che l'esperanto offre, come ad esempio il premio Marelli o il *Pasporta Servo*, ma ci saranno anche momenti di gioco, di lavoro, di gruppo per movimentare l'incontro. Niente di pesante e noioso, insomma: tranquilli.

Chi saranno presenti in veste di organizzatori?

A Vicenza ci saranno Manuel Giorgini, presidente della IEJ e il consigliere Daniele Binaghi. Daniele: daniele@esperanto.it 0444-730315

Manuel: phalanx@kyuzz.org 041-5203245

A Napoli le consigliere Bethuel Chiesa e Sonia Tavarone.

Bethuel: bethuel.chiesa@esperanto.it
 011-730210, oppure 0321-4321,
 cell. 0347-8269827

Sonia: sonia.tavarone@esperanto.it
 011-9440881, cell 0347-9672572

Per quanto riguarda Frascati si deve fare un discorso diverso perché si tratta di incontrarsi con una classe di liceo che sta studiando l'esperanto per uno scambio con dei coetanei di Strasburgo. Ma ogni ulteriore persona sarà benvenuta.

Per i partecipanti è previsto il rimborso minimo delle spese di viaggio.

Chiunque voglia saperne di più può richiedere tutte le informazioni che reputa opportune agli organizzatori.

A tutti gli iscritti giovani, ai *kirekanoj* a coloro che ci hanno contattati quest'anno verranno spedite comunque delle lettere di invito.

Partecipate numerosi e soprattutto:
PASSAPAROLA!

Per la IEJ

Bethuel Chiesa



Bonvenon en Bolsenon!

25a Internacia Junulara Festivalo

Bolsena (Viterbo), Italio. De la 11a ĝis la 17a de aprilo 2001
“2001: Lingva Odiseo”

La jaro 2001 deklariĝis “Eŭropa jaro de lingvoj”. Do kia ŝanco pli bonus por valorigi la temon “plurlingvismo”? Kaj kia maniero alfronti la diskuton pli bonus ol organizi Internacian Junularan Festivalon?

Ni povas bildigi junulojn kiel modernajn Odiseojn, malkovrantajn en si mem la emon plivastigi siajn konojn kaj satigi sian homan scivolon. Do ili pretigas sin entrepreni vojaĝon por realigi tiujn dezirojn, marvojaĝante tra la mondo. Baldaŭ la juna vojaĝanto konstatas ke multaj aferoj ĉirkaŭ li rapide ŝanĝiĝas, kaj multaj aliaj tute novas. Mirigite kaj ĉarmite de la malsamaĵoj lin ĉirkaŭantaj, li klopodas proksimiĝi al ili, sed baldaŭ li konsciiĝas ke la malsamecoj esprimiĝas diversmaniere: por atingi la celon ne plu sufiĉas al li la scipovo de lia lingvo; li malkovras ke necesas lerni ankaŭ aliajn.

La Festivalo celas ĝuste tion: kunmeti, kompari kaj komuniki la malsamaĵojn, proponante spacojn kaj programerojn por renkontiĝi kaj por aliri la diversajn lingvojn, interkulturajn ekzercojn kaj ludojn, rekte enplektante ankaŭ la personajn spertojn de la partoprenantoj kaj proprigante al ili la valoron de plurlingvismo.

... kaj, ne timu! Ni ja pretigos plurajn distrajn kaj vesperajn programerojn, por tiuj el vi kiuj senĉese serĉas la bonan etoson!

Dum la festivalo okazos fotokonkurso. La temo estos ‘Pasintaj Italaj renkontiĝoj’. Tiuj kiuj ŝatus partopreni, bonvolu porti belajn fotojn de antaŭaj festivaloj en nia lando, kaj informu la organizantojn. Partopreno estas senpaga. Premioj por la gajnantoj. Atentu: la fotoj ne estos redonitaj.

La Ejo

La ĉi-jara Festivalejo estas ĉe-laga konstruaĵo tre proksima al la malnova urbocentro. La adreso estas: La Colonia – V.le A. Diaz, 30 – IT-01023 Bolsena (VT), ? +39 0761 799001.

Kiel alveni aŭte: Venante de nordo, eliru el la aŭtoŝoseo A1 en Orvieto kaj sekvu la indikojn sur ŝtata ŝoseo al Bolsena. Venante de sudo, eliru el la aŭtoŝoseo A1 en Orte, veturu laŭ la rapida vojo “Orte -Viterbo” kaj poste laŭ “via Cassia” de Viterbo ĝis Bolsena.

Kiel alveni trajne: de Firenze prenu trajnon ĝis Orvieto; de Orvieto, prenu aŭtobuson al Bolsena. De Roma, prenu trajnon ĝis Orvieto aŭ Viterbo; de tie, per aŭtobuso atingebblas Bolsena.

Kotizoj

Estas 4 landokategorioj, faritaj laŭ la riĉeco kaj la distanco de Italio. La kotizoj estas en miloj da liroj (mil liroj estas iomete pli ol unu germana marko). La aliĝperiodoj estas:

A Ĥis 15.02.2001 **B** De 16.02 ĝis 23.03.2001 **C** Poste / surloke

Kaze de partatempa restado, la kotizo de ne-memzorgantoj estas tiu de la aliĝperiodo C por iliaj lando- kaj aĝokategorio, dividita per 6 kaj obligita per la nombro de tranoktoj. Memzorgantoj pagas ĉiukaze la tuttempan kotizon.

Krompagoj kaj rabatoj:

- * Ĉiu kiu petos inviteletron (nepre antaŭ 20.02.2001) devos kontribui al niaj elspezoj per 10 000 ITL
- * La italoj ne anoj de IEF/IEJ devos krompagi 50 000 ITL (eĉ por unu sola tago) aŭ aniĝi surloke
- * Por 1- aŭ 2- persona ĉambro la krompago estas po 10 000 ITL tage por persono.
- * Subtenantoj de IEJ ricevos 10%-an rabaton
- * La kontribuantoj al la programo ricevos rabaton laŭ interkonsento.

En la aliĝilo kaj en ĉiuj komunikoj, bonvolu skribi latin-preslitere!



Nomo: _____ naskiĝdato (TT.MM.JJ) _____

Sekso: Ina • Malina • _____

Strato _____

Poŝtkodo _____ Urbo _____

Loĝlando (esperante) _____ Telefono (internacie) _____

Retadreso _____

• Mi volas ke sur mia nomŝildo anstataŭ mia loĝlando

aperu alia lando : _____

Atentigoj

La loĝantoj de transpagipovaj landoj sendu aliĝilon kaj antaŭpagon de 60 000 ITL; la aliaj sendu nur aliĝilon se ili aliĝas poŝte, sed se ili aliĝas persone ili antaŭpagu 30 000 ITL. Ĉiukaze via aliĝo validos (kaj vi povos certi pri via loko) nur post ricevo de konfirmo. Nepre kunportu pruvilon de la antaŭpago. La kotizoj de nememzorgantoj inkluzivas programon, loĝadon en ĉambro kaj manĝadon ekde la vespermanĝo de la 11a ĝis la tagmanĝo de la 17a de aprilo. La kotizoj de memzorgantoj inkluzivas nur programon kaj loĝadon en aparta ejo.

Oni ne redonos la antaŭpagon al malaliĝintoj; oni redonos eventualan kroman pagon, nur se la malaliĝanto informos nin antaŭ la 15a de marto 2001. Eblas transdoni sian aliĝon al ne-aliĝinto, kondiĉe ke tiu prezentu skriban ateston de la transdoninto. Ni alĝustigos la kotizon, sed ĝi ne povos malaltiĝi. Ne eblas transdoni de pluraj antaŭpagoj al sama persono. Por ĉiu persono necesas aparta aliĝilo: grupa aliĝo ne estos akceptita.

Sendu...

Aliĝilon:

Giovanni Quer, V.le Italia 18, IT-31033 Castelfranco Veneto (TV),
 ✉ ijf.admin@esperanto.it, (nur se urĝas) ☎ +39 0423 491564 aŭ (prefere)
 +39 0339 2295096 (sekvas) ⇔

✂ -----

Mi aliĝas al la 25a IJF kiel partoprenanto

tuttempa • Mi ŝatus loĝi kun _____

partatempa • de _____ ĝis _____ Mi antaŭpagis _____ ITL

vegetarano • memzorganto • (banke • poŝte • tra UEA •)

• Mi bezonas inviteteron al Italio, do mi donas ĉiujn necesajn informojn - minimume:

pasportnumero _____ valida de _____ ĝis _____

Mi proponas jenan kontribuon por la • tema • distra • vespera programo/konkurso

Mi akceptas ĉiujn kondiĉojn.

Dato (TT.MM.JJ.)

Subskribo

Antaŭpagon:

- Bankokonto: Gioventù Esperantista Italiana, ABI: 3002, CAB: 2002, c/c: 650791/19,
SWIFT: BROMIT 2V, Banca di Roma, Filiale di Venezia, Agenzia n. 8
- UEA-konto: ieja-z
- Per poŝtomandato adresita al Giovanni Quer

Programkontribuojn:

- Temajn: Chiara Baro, V. Virgilio 5, IT-31025 S. Lucia di Piave (TV),
✉ chiara.baro@esperanto.it, ☎ +39 0438 700519
- Distrajn kaj vesperajn: Daniele Binaghi, V. Terminon 57, IT-36020 Villaganzerla (VI)
✉ daniele@esperanto.it, ☎ +39 0444 730315; kaj Bethuel Chiesa, V. Guicciardini 31, IT-28100 Novara, ✉ bethuel.chiesa@esperanto.it, ☎ +39 0347 8269827

LOĜLANDO	ALIĜ- PERIODO	KOTIZO				
		Ne memzorgantoj (Aĝo je 19.04.2000):				
		0-19	20-24	25-29	30 +	
Aŭstrio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Italio, Liĥtenŝtejno, Luksemburgo, Monako, Nederlando, Sanmarino, Svislando, Vatikano	A	260	290	320	350	140
	B	285	315	350	385	
	C	315	350	385	425	
Andoro, Britio, Finnlando, Malto, Norvegio, Svedio	A	240	265	290	320	
	B	260	290	320	355	
	C	290	320	350	390	
Aŭstralio, Ĉeĥio, Greklando, Hispanio, Hungario, Irlando, Islando, Israelo, Japanio, Kanado, Kroatio, Novzelando, Pollando, Portugalio, Singapuro, Slovakio, Slovenio, Sudkoreio, Tajvano, Usono	A	220	240	265	295	70
	B	240	265	295	325	
	C	265	290	320	355	
Ĉiuj ceteraj	A	200	220	245	270	
	B	220	245	270	295	
	C	240	265	295	325	

25^a Internacia Junulara Festivalo



"2001: Lingva Odiseo" **iej**

itala esperantista junularo

Bolsena (Viterbo), Italio
De la 11^a ĝis la 17^a de aprilo 2001

SERIOZE SED ETOSE

Il tema del 25esimo Festival internazionale della gioventù, che si terrà dall'11 al 17 aprile a Bolsena (VT), è "2001: Lingva Odiseo", chiaramente ispirato al "2001, anno europeo delle lingue" proclamato dall'Unione Europea. Per questo motivo vorremmo organizzare, all'interno del programma tematico, un ciclo organico di brevi seminari che consentano ai partecipanti di avere idee più chiare su i seguenti argomenti:

1- Le politiche linguistiche e di tutela delle minoranze proposte dall'Unione Europea, lo stato normativo attuale e gli interventi adottati.

2- Qual è la posizione delle principali associazioni del movimento esperantista e dei gruppi di discussione a tal proposito e quali le attività al riguardo.

3- Quali strategie e progetti per il breve e medio termine attuare per far crescere il movimento e i giovani esperantisti, e quale il realistico ruolo dell'esperanto all'interno dell'Unione Europea.

Per questo invitiamo tutti coloro che si occupano di tali problematiche, ad intervenire per mezzo di brevi *prelegoj*. Lo scopo è di creare all'interno del Festival un Laboratorio di studi e discussioni che generino qualcosa di fattivo ed educativo per i ragazzi.

Chi voglia collaborare è pregato di rivolgersi alla responsabile del programma tematico Chiara Baro: 0438 700519 - c_baro@yahoo.com orientativamente entro il 10 di marzo presentando anche una breve sintesi dell'argomento che vorrà trattare.



Bolsena - La sovaĝa apudlaga peizaĝo



La vilaĝo Bolsena

Nova Sento
a cura della
Gioventù Esperantista Italiana



Redazione:
Michele Bondesan
via Baroni, 26
45100 Rovigo

Telefono: 0425-23566

Posta elettronica: mikebond@tin.it
Conto bancario intestato a
Gioventù Esperantista Italiana,
ABI 3002, CAB 2002, c/c 650791/
19, SWIFT: BROMIT2V, Banca di
Roma, Filiale di Venezia, Agenzia
n. 8

Conto corrente postale
n. 11110251 intestato a
Gioventù Esperantista Italiana
presso Manuel Giorgini, S. Polo
606, 30125 Venezia